

Bolanta Kaldrono



INFORMILO 276 de la
Esperanto - Grupo Bremen
Julio - Septembro 2005



Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943


Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480

Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715

Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 HB, Tel/Fax 8476806, hartig.hd@t-online.de

Vizitu nin en Interreto: www.esperanto.de/bremen


Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm und unsere Zeitung Informilo



*Forlasis nin por ĉiam nia altŝatata amiko
kaj unu el la plej kapablaj membroj de nia grupo*

Kurt Meyer

Nekrologo



Kurt tre ŝatis la desegnaĵojn en nia Informilo. Jen la lasta akompanu nian nekrologon.

Kara Kurt, ni ĉiuj en la grupo estas tre, tre malgajaj pri via forpaso. Vi estis la animo de nia grupo kaj jardekojn vi zorgis pri la kvalito de nia laboro. Viaj kontribuoj kaj prelegoj ĉiam estis atkvalitaj kaj via celo estis, instigi nin korekte uzi nian lingvon.

Ĝis la lasta momento de via vivo vi interesigis pri nia agado kaj konsilis aŭ instigis. Ni daŭrigos nian agadon en via senco. Ĉiam vi estos nia modelo.

Akceptu nian sinceran dankon.

Ni sincere klinas nin antaŭ vi, kara Gunthild, kaj kondolencas tutkore. Ni kunsentas vian doloron kaj deziras al vi forton travivi tiun sorton. Ĉiuj membroj de nia grupo pensas al vi.

Nome de la grupo kondolencas Dieter Hartig

Nia Programo

La 6an de julio Ĝardenfesto en la ĝardeno de Ruth Bohn. *Ekde la 17a horo*

Ĝardenfesto en la persikoflora vojo (Pfersichblütenweg)



Wegebeschreibung:

Hinter dem Waller Bahnhof (hinter der Verkehrsampel) links in die Fleetstraße, dann aber **LINKS** am Fleet entlang bis zum Ende, wo es dann links in den Wiesenweg geht. Ziemlich am Ende dann rechts befindet sich der Pfirsichblütenweg.

Parkmöglichkeit (extra für Gäste) vorhanden.

Vi estas kore bonvenaj travivi kune feliĉan, agrablan ĝardenfeston!

Kunprenu la viandaĵojn kiujn vi deziras rosti; ĉefe bonan veteron bonan humoron kaj gajajn poemojn,

ĝojigajn kaj aliajn frandaĵojn por prezenti laŭokaze.

En aŭgusto ni ferias.

La 7an de septembro

La 12an de oktobro

La 09an de Novembro

Ni deziras al vi agrablan feriadon kaj abundan sunbrilon.

Postferia kunveno.

Ĉiu raportu pri siaj feriaj travivaĵoj.

Diskuto pri aktualaĵoj.

Hans-Walter Krüger prelegos pri :

Ĉu la evolua stagnado signifas malprogreso?

Lingvaj studaĵoj.

Preparos [Kurt], Hellmut kaj Franz

Retrospegulo

La 13an de aprilo ni komencis la cerbumadon pri la programo de nia 100-jara jubileo. Kunvenis nur sep gemembroj.

Nia grupestro Hellmut Grebe malfermis la diskutvesperon. La temo okupis nin la tutan vesperon, unue ne tro entuziasma. Dieter proponis utili la spertojn el la 75a jubileo, sed tio ne estis akceptitaj, ĉar nun estas tute alia situacio. Hans-Walter verkis tutpaĝan liston da interesaj proponoj. Ideoj venis el diversaj cerboj, ĝis fine restis kelkaj, kiuj vekis komunan intereson:

Kiel renkontlokoj, kiuj estu laŭeble en la urbocentro, ni elektis la junulargastejon, en kiu ni povas ankaŭ mendi manĝaĵojn. Kaj due en nia kunvenejo Bolanta Kaldrono (Brodelpott), kie estas eĉ scenejo. En Brodelpott ni povos ankaŭ ekspozicii.

Hellmut deklaris sin preta, esplori la du eblecojn.

Krome ni aranĝos urbrondiradojn en Esperanto, snuf-kursoj en Esperanto. Grave estas ankaŭ publikigoj kaj intervjuoj en niaj urbaj gazetoj.

Ankaŭ festbroŝuro estas planita, La titolpaĝo kaj du paĝoj jam estas pretaj. Tiun taskon transprenis Dieter.

Ĉe la fino de la grupvespero ni ĉiuj sentis bonan komencan rezulton.

Dieter

Hartig

La grupvespero de la 18-a de majo 2005.

Ĉeestis 8 personoj, inter ili 2 el la grupo Subvisurgo.

Markus Beckmann prelegis pri la temo “Kio estas homeopatio – alproksimiĝo al alternativa kuracmetodo”. Ni eksciis multon pri la ekesto, la principoj kaj la apliko resp. efiko de la homeopatio.

La kreinto estis Samuel Hahnemann (1755 – 1843). Oni povas diri, ke Hahnemann havas la saman signifon por la homeopatio kiel Zamenhof por la Esperanto – movado.

Mi ne volas raportii ĉiujn detalojn de la prelego, sed tamen menciui kelkajn bazajn tezojn:

Ĉiu homo havas en si vivoforton. Laŭ Hahnemann ĉiu malsano estas perturbo de la spirita vivoforto. Se kuracisto volas sanigi homon, li intense devas demandi lin pri la simptomoj kaj pri vivcirkonstancoj, kaj li devas bone aŭskulti por ekkoni la verajn (spiritajn) kaŭzojn de la malsano. Tio signifas, ke medicino ne estas aplikata por forigi la malsanon, sed por helpi la vivoforton reguli la organismon. Tio ankaŭ signifas, ke ĉiu patiento bezonas “sian” propran medikamenton.

La homeopatiaj medikamentoj estas produktataj laŭ la principo “similaĵo sanigu similaĵon”. Ili subtenas la spiritajn fortojn de homo.

Markus raportis detale ankaŭ pri medikamentoprovoj kaj pri la potencigo de substancoj. Estas mirige kiom malmultaj molekuloj povas efiki: "Ju malpli da materio, des pli da forto". Pro tio ofte estas malfacile konstati, ĉu iu pliboniĝo de la sanstato venas el la homeopatia traktado aŭ eble el iu samtempa alia kuracmetodo. Kvankam la homeopatio helpis/helpas homojn en multaj kazoj, la asekuroj ĝenerale rifuzas pagi tiun kuracmetodon, ĉar la efiko ne estas pruvebla per natursciencaj reguloj. Do: Kio estas pli fidinda, la naturscienco aŭ la homeopatio? Tio verŝajne ne estas simpla alternativo. La patiento mem devas decidi kaj provi, kio ne nur forigas la simptomojn de malsano, sed la malsanon mem per la forigo de la veraj kaŭzoj.

Koran dankon, kara Markus, pro tiu ĉi interesa grupvespero, kiu instigis nin al vigla diskutado surbaze de via kompetenta kaj bone komprenebla prelego!

Hellmut Grebe

“Dek jaroj da ekzisto de la Esperanto-Grupo Unterweser.”

estis la titolo de la invito partopreni. Ni venis tre volonte, ne nur ĉar Esperantistoj el Nederlando kaj Belgio estis invititaj, sed ankaŭ por montri nian ĝojon pri tiu vigla kaj simpatia grupo.

La kunveno okazis en Rodenkirchen en gastejo apud sportboathaveno. Kvankam tiu gastejo estis kaŝita inter digo kaj akvo fluoj, ĉiuj trovis la renkontlokon. La gastejo estis konstruita sur digo kaj aldone sur stilzoj, por ke la foje altnivela akvo ne subakviĝu la domon. En la haveno estis belaj kaj ankaŭ grandaj vel- kaj motorboatoj. Inter ili ankaŭ la tabulŝipo, per kiu ni poste ekskursis.

Blovis tre forta vento, tiel ke niaj vestaĵoj flirtis kvazau flagoj. Eĉ en la kabano, en kiu ni kunvenis okazis tiel forta trablovo, ke buŝtukoj kaj aliaj paperaĵoj kirlis tra la ejo.

La etoso estis tre bona kaj gaja. Ni kune tagmanĝis salatojn kaj aldone rostitajn kolbasojn kaj viandon. Per la tabulŝipo veturis la gastoj grupe. La kapitano atentigis pri la vidindaĵojn, kiujn ni preterveturis. La forta vento estigis altajn ondojn, kiuj foje priŝpruĉis la pasaĝerojn.

Posttagmeze kantis marista ĥoro. Antaŭ la adiaŭo ni estis regalitaj per kafo kaj kuko (membakitaj). Por ni el Bremen tre ĝojis revidi niajn nederlandajn geamikojn. Ni interkonsentis kunvenon en Oldenburg. Tie ni intencos festi la Zamenhoffeston en internacia rondo.

Jen ni sendas koran dankon al niaj geamikoj de la grupo subvisurgo, ke ni povis partopreni al via jubilea kunveno.

Ni deziras al vi prosperan estonton kaj ĝojon per nia lingvo Esperanto.

Dieter Hartig